# *Kubo en Martí: kun ?iuj kaj por ?ies bonfaro.*



Okaze de la 120-a datreveno de la forpaso de la kuba apostolo José Martí, hodia? okazos diversaj oma?oj al la plej elstara kubano, kies vivo rekte influis kaj da?re influas la vivon de la kuba popolo.

José Martí estas konata kiel elstara patrioto kaj revoluciulo, naski?inta en Havano la 28-an de januaro 1853. Estante tre juna, nur 16-jara, li komencis esprimi siajn sociajn, patriajn kaj sendependigajn idealojn, kio kondukis lin al malliberejo.

En 1875 li estis forpelita al Hispanio, en kies ?efurbo li publikigis eseon nomatan “La politika malliberejo en Kubo”, kiu konsistigas fundamentitan kaj viran denuncon pri la abomeninda?oj de la kolonia re?imo altrudita al la insulo dum tiu plurjarcenta periodo.

La eksterordinara pensado de Martí, tre klara kaj certa pri la estonteco de Kubo, lia rifuzo kontra? ?iuj malbonoj ekzistantaj en la amerikaj respublikoj, kontra? rasismo, kontra? la imperiaj celoj de la norda najbaro en tiom frua periodo, igas lin aktuala kaj viva en la kuba popolo.

Li estis poeto, verkisto, ?urnalisto, sed ?efe organizanto de la nomata “necesa milito” por batali “ne kontra? la hispanoj, sed kontra? ties sistemo kaj kolonia regado”, kio evidentigas lian elstaran klarvidon.

Li esprimis sian konfidon pri tio ke la kuba popolo scius konstrui socion liberan je tiuj malsanoj. Pro tio estas tre konataj kaj sekvataj liaj edukaj instruoj kiuj emfazas ke “scii estas posedi” kaj tial “veninte al la tero ?iu homoj rajtas esti edukita kaj poste, kiel pago, devas kontribui al ?ies edukado”.

La 19-an de majo 1895 José Martí forpasis dum batalo en loko nomata Du Riveroj, en la orienta parto de la insulo. Tiel li plenumis sian propran destinon irante al batalo kontra? la hispanaj trupoj, fidante je estonta respubliko por Kubo en kiu la valoro de la popolo estu konstruata sur edukaj principoj kiuj konsideru ke “la plej feli?a popolo estas tiu kies filoj plej bone edukitas, en la penso-instruoj, kaj en la sento-direkto”.

---

[https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/56399-kubo-en-marti-kun-ciuj-kaj-por-cies-bonfaro](https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/56399-kubo-en-marti-kun-ciuj-kaj-por-cies-bonfaro)

**Radio Habana Cuba**